



BULTENO
DE

Malaga
Esperanto
Grupo

La Ĝenaĉero

URGA CELO: DUOBLIGI

Tuj ni komencos novan lernojaron post la periodo de someraj ferioj, en kiu ni atingis la okazigon de la "3a Andaluzia Kongreso". Bonŝance, ĉiuj partoprenintoj konstatis, ke la nombro kaj la esperantisteco de la kongresanoj plialtiĝis ĉi-foje kaj iom post iom formiĝas grupeto da kapablaj samideanoj en nia regiono. Oni rajtas ĝoji pro tio; pleje, post la penado por atingi novajn celojn realigita de aŭtentikaj esperantistoj. Tamen, se ni sinceras, ni ne rajtas halti rigardante la pasintecon. Ni devas plani serioze, por ke la venontan kongreson en Granado ni tutkontente rajtu festi pro la sukcesoj de la lernojaro 1985-86. Kion oni povas fari?

Aparte de konkretaj agadprogramoj de ĉiu grupo -aŭ unuopulo- mi ŝatas urĝe duoblige nian partoprenon en la funkciado de la Andaluzia Esperanto-Unuiĝo. Hodiaŭ, eble pli ol antaŭe, necesas kunigi la penadon de ĉiuj por efiki. Ni bezonas kreski kvante kaj kvalite por allogi pliajn personojn al la Movado. Tial, ĉiu el ni konsciu pri la graveco de sia kunlaboro. Nepras duoblige la nombron de Elementaj Kursoj, kapabligi jen ĉeestante la semajnajn kunvenojn, jen

(pluas sur la 6a paĝo)

libroj kaj revuoj pruntitaj. Oni agos laŭ la reguloj akceptitaj de ĉiuj en la pasinta jaro.

Pri la revuo, samideano Francisko Ksavero Moleon (Ksaĉjo) el Madrido oferis sin por korekti, tajpi kaj foje verki artikolojn. Samideanino M^a José Quesada fotokopios kaj disdonos la ekzemplerojn. Ĉar la revuo estas dumonata, oni devas havigi al Ksaĉjo la artikolojn, klare skribitajn, antaŭ la komenco de la dua monato de ĉiu periodo.

Pri monrimedoj ĉiuj decidis ne plialtigi la monatan kotizon, sed plimultigi la enspezojn per ekskursoj (por esperantistoj kaj neesperantistoj), vendado de loterio, vendado dum kristnasko de la ŝaŭmvino "Esperanto" (se eblos), ktp.

Fine ni diru, ke la konkludoj kaj rezolucioj de ĉi tiu kunveno validos por unu jaro, ĝis la kunveno okazonta la venontan septembron.

Feliĉan aŭtunon!

Pri la enhavo de la artikoloj responsas la aŭtoroj

LA MOVADO

Jen ĉi-sube vi povas trovi la ceterajn konkludojn kaj rezoluciojn, kiujn oni akceptis en la pasinta 3a Andaluzia Kongreso:

-Pri "Instruada Servo de AEU":

-atingis la diplomon pri Elementa Kurso 8 novaj gesamideanoj.

-oni aprobis la prezon por la Diplomo, kiu estos 300/350 pes.

-la respondeculo pri la Instruada Servo atentis ĉiujn specialajn cirkonstancojn rilatajn al ekzamenoj, liverado de diplomoj, rajtigo de Esperanto-instruantoj, k.s.

-Prizorgi la sendadon de la koncerna materialo por atingi la enskribon de AEU en la Registron de Privataj Asocioj, akorde kun la dekretoj 89/1985 de la 2a de majo kaj 3a de julio 1985 de la Konsilantaro pri kulturo de la Andaluzia Registaro.

-Instigi la gejunulojn partopreni en la funkciado de la Junulara Sekcio de AEU (Andaluzia Esperanto-Junularo).

-Instigi la respondeculojn de Publikaj Bibliotekoj pliiĝi ties stokon pere de la aĉetado de Esperanto-verkoj.

Ci-cele oni rekomendas al ĉiu esperantisto/grupo kontakti la bibliotekestrojn kaj havigi al ili la respondajn katalogojn.

-Kontakti komputorajn firmaojn kun la celo instigi ilin demokratie enkonduki ĉiujn nacilingvajjn literasignojn.

Oni atentigu ilin pri la neceso provizi la uzantojn je hardvaraj aŭ softvaraj sistemoj por la ĝusta komputortajpado de Esperanto.

-Oni oficiale dankis la firmaon Mikroshop, de Seviljo, pro la pruntedonitaj mikrokomputiloj, kaj la Urbestraron de Seviljo pro la belaj Kongreslibroj kaj afiŝo eldonitaj.

En Seviljo, la 18an de aŭgusto 1985

La traduko

Ce la esperantistoj oni kutimas traduki poemojn, informojn, prospektojn kaj eĉ artikolojn por praktiki la lingvon kaj samtempe havigi al aŭlilandaj samideanoj sciigojn pri naciaj atentindaĵoj. Tio tre gravas por profundigi prilingvajn konojn. Tradukistoj konscias kaj fieras pri tio kaj mi gratulas ilin elkore. Sed, aldone, jen io pri la temo.

Necesas diferencigi inter bona traduko kaj utila traduko. La unua estas la verko de persono konanta la precizajn vortojn kaj esprimojn de la lingvo, en kiu oni skribis, originale, la verkon, kaj samtempe la respondajn de la lingvo, en kiun oni tradukas ĝin. Kontraŭe, la celo de utila traduko estas la konservo de la enhavo de la originala teksto, kvankam ĉi ties formo ne estu respektata plene. Plie, iuj kvalifikas bona la tradukon de literaturaj verkoj, se ĝi okazigas saman plezuron kiel la originala teksto. Sed rimarkindas, ke tiu plezuro estas tre malsimpla, ĉar ĝi dependas de la ideoj kaj sentoj esprimitaj, la vortoj, la intelekta kaj afekcia resonoj kaj, lasence, de la muzika valoro, kiel okazas ĉe versoj. Vere malfacilas al la tradukanto okazigi, per sia laboro, saman rezultaton kiel la originala teksto.

Aliflanke, tre ofte partoprenas la gramatikistoj. Dum kelkaj tradukistoj postulas planan liberon rilate al la originala teksto, celante verki ankaŭ originalan tradukon, la gramatikistoj petas la submetiĝon de la tradukisto al la aŭtoro, kaj tion, ke la traduko ne enhavu ion ne estantan en la verko de ĉi lasta.

Sed la kerno de la afero konsistas en tio, ke malfacilas scii, kio estas ĝusta traduko.

Ciukaze notindas, ke bona traduko parolas ne nur pri la kapabloj de la tradukisto, sed ankaŭ pri la sensacio, kiun la originala teksto okazigas en lian spiriton. La bona tradukisto ne tradukas por kompreni, sed ĉar li komprenis, kaj nepras,

ke tiel estu ne nur por kapabli traduki, sed eĉ por kuraĝi traduki. Kio signifas, ke la lernanto ne devas traduki, escepte de tiam, kiam li komprenis kaj, tial, la instruisto ne dexas peti, ke li traduku ion ne komprenitan.

Alia afero estas, la teknika procedo laŭ la diversaj lingvoj kaj la maniero konstrui la frazon. Lingvoj kiel la latina aŭ la greka, kun abunda hiperbato, malsimpligas la taskon, kiam necesas traduki el ili. La germana, la araba, Esperanto mem malfaciligas, simile, la laboron pro tio, ke ili havas fleksian deklinacion kaj konjugacion jen tute, jen parte, kaj havigas la uzon de la menciita dirmaniero. Tial oni devas agadi zorge, kiam oni tradukas, ĉar iuj lingvoj abundas je fleksioj, dum aliaj je prepozitivoj, unuj je verbaj esceptoj, dum aliaj tute ne -aŭ malmulte- havas ilin, ktp. Aliflanke, nepras identigi la frazelementojn kaj tuj poste ordigi la frazon, se necese, ĉar, alie, t.e. se almenaŭ intuicie oni ne identigas la subjekton kaj la predikaton -kun la respondaj suplementoj aŭ komplementoj-, tute maleblas kompreni la frazon. Guste tial, laŭvorta traduko tre ofte malutilas kaj la rilata rezultato estas tute absurda.

Kompreneble, ne ĉiuj personoj bezonas ordigi ĉiun frazon metante unue la subjekton kaj ties suplementojn, kaj due la predikaton kun ties komplementoj (objektaj, adjektaj). Tamen, almenaŭ je la komenco, konvenas analizi multajn frazojn antaŭ ol traduki, se oni ne deziras fiaski. Nur post ol la koncerna ordigo eblas kompreni la signifon de la frazo, kaj nur post la kompreno de la frazo eblas traduki sukcese.

Neniam forgesu tion. Alie vi nek bonan, nek eĉ utilan tradukon atingos.

Ne hezitu aĉeti la novan libran furoraĵon

"La mil manieroj mistraduki"

de Ludoviko Lazaro Stultulof. Nepre necesa por ĉiu fuŝulo de nia Vomado!

(432x563, 10865 paĝoj, lede bindita. ISBN
57 1968 212 0)

LETERO EL LA DIREKTORO

Jes, karaj legantoj, ĉi-numere ĉi sekcio ŝanĝas sian nomon. Unuavice pro la fakto, ke absolute mankas ia letero por la direktoro. Kaj duavice, ĉar, diable!, ankaŭ la direktoro rajtas fojfoje eldiri sian opinionon!

Mi ja ne estas la direktoro, sed la kunmetanto. Jen do en viaj manoj la unua numero, kiun mi kunmetas. Mi ankoraŭ ne konas la ruzaĵojn por bone fari ĝuste ĉi revuon, do bonvolu senkulpiĝi erarojn, fuŝojn kaj similaĵojn, kiujn vi eventuale trovus. En la sekvaj numeroj espereble estos malpli de ili. Intertempe, ege bonvenas ĉe la kunmetanto ĉiaj kritikoj, korektoj, ĝustigoj, laŭdoj, mallaŭdoj, opinioj kaj ĉio ajn, kion vi konsideros oportuna kaj necesa (prefere en la formo de letero al la direktoro!). Ĉi revuo povas esti tia, kia ĝi plaĉas al vi, sed unue vi devas informi, kia ĝi plaĉas al vi!

Ksaĉjo

(El la 1-a paĝo)

perkoresponde por la atingo de la diplomoj de la Elementa kaj Meza Kursoj, okazigi festajn kunvenojn de esperantistoj kaj simpatiantoj, verki por La Cenaĉero kaj Gazeto Andaluza kaj ĉiam paroli en Esperanto kun la esperantistoj.

Pensu, ke, se oni ne antaŭeniras, necese oni malantaŭeniras. Tio okazas ĉiam, egale, ĉu temas pri Esperanto aŭ pri ajna alia afero. Mi proponas do al ĉiu leganto cerbumi pri sia agado dum la pasinta tempo kaj kalkuli la eblojn fari ion por la Movado. Tute certe, li eltrovos gravajn kaj tre satigajn ŝancojn por plibonigi sin kaj sian etoson multoble.

Nun estas la plej taŭga momento por komenci. Ekigu, do!

Kaj ne forgesu la sloganon: "Ĉi-foje, almenaŭ duobligi".

Andrés

Kiel heroldite en la oka numero de "La Cenaĉero", okazis en Madrido de la 21a ĝis la 23a de septembro ĉi-jare la ĉiujara aŭtuna HEJS-kunveno. Kiel kutime, foje noktaj diboĉoj, foje muzeovizitoj (Prado), foje plene seriozaj kunsidoj. Malsamaj kaj tre interesajn konkludojn oni akceptis en ĉi HEJS-Kunveno. Jen la ĉefaj do:

-**"Pandemonio"**: jam troviĝas kelkaj originaloj, kaj pliaj aŭtoroj diligente verkas por ĝi. AEU kaj HEJS eksubvencios ĝin, sed ankoraŭ mankas mono. Oni klopodos por ĝin atingi el diversaj instancoj.

-**KAPE, Komputor-Amantoj Por Esperanto**: tiu organizaĵo verŝajne fariĝos HEJS-sekcio, kaj tiam nia junulara organizo komence monapogos ĝin. La unuan numeron de ties organo, "Se... do...", subvencios HEJS.

-**Venontjara tendaro**: okazonta en pasko en Zaragozo. Oni akceptis provizoran programon, kiun vi, povas peti de la LKK (ZEJ, poŝtkesto 149, 50080 Zaragozo). En Zaragozo oni penas atingi plej malkostajn restadejojn, kaj la tiea grupo de nun ĝis la tendaro eldonos kaj sendos gazeton al la grupoj kiu gazeto estos ricevebla senpage.

Plej grava en la tendaro estos la prelego de akademiano Fernando de Diego, kies temo estos "Kio povas doni Esperanto al la junaj?".

-**Broŝuro**: HEJS eldonos broŝuron hispanlingvan, kiu reliefigos la praktikajn flankojn de Esperanto (korespondado, vojaĝoj, ktp.). La kvanto de ekzempleroj estos du mil, kaj la prezo inter ses mil kaj sep mil pesetoj. Ĝi estos ofsetata el la originalo elektratajpile ellaborita.

-**Kontakto**: post la ekŝiĝo de HEJS el la revuo **Koncize**, nia organizo abonos **Kontakton** por siaj membroj. Tiucele oni ricevos monon el valenciaj oficialaj instancoj. Ekde 1986 la membroj do ekricevos ĉi revuon.

SAPOJ: KIEL ILI FUNKCIAS

(Tria parto)

Ĉi Kiam ĉi tiuj lastaj estas pli intensaj ol la unuaj, formiĝas vera solvaĵo, ekzemple, alkoholo en akvo. Kontraŭe, ekzemple inter ia ajn oleo kaj akvo, ne eblas formado de koloidaj emulsioj, se oni ne aldonas stabiligan substancon, ĉar la fortoj de altiro inter samspecaj molekuloj (oleo-oleo kaj akvo-akvo) estas pli intensa ol tiuj, kiuj ekzistas inter molekuloj malsamspecaj (oleo-akvo).

La stabiligadon de hidrofobiaj koloidoj oni povas atingi per du malsamaj manieroj: jen pere de la tiel nomataj protektantaj koloidoj, jen per la adsorbado de jonoj.

Kiam oni subakvigas teksaĵon kun makulo de oleo sur ĝi, formiĝas emulsio de oleo en akvo. Eblas stabiligi ĉi tiun emulsion, se oni aldonas al akvo etan kvanton da sapo, kiu efikas kvazaŭ protektanta koloido. Tiukaze, ĉar temas pri emulsio, la koloido protektanta nomiĝas ankaŭ emulsiiga aganto.

Sapoj estas hidrofilaj koloidoj kaj ilia stabiliga agado devenas de la formado de membraneto aŭ unumolekula tavolo, kiu ĉirkaŭas la partetojn aŭ gutetojn de la hidrofobia koloido, kiel videblas en la desegno:



(1): olea guteto

La hidrokarbida parto de la molekuloj de sapo direktas sin al la interno, altiritaj de la oleaj molekuloj, dum la pelaraj grupoj direktas sin al

(pluas sur la 10a paĝo)

Kunlaboraĵoj

BELARTAJ KONKURSOJ DE UEA

La Belartaj Konkursoj de Universala Esperanto-Asocio komenciĝis en 1951 laŭ tiama propono al UEA de Reto Rossetti, kaj de tiu jaro ĝis nun ili seninterrompe okazadas. La Belartaj Konkursoj havas la celon evoluigi la diversajn artobranĉojn en la Internacia Lingvo aŭ pere de ĝi. Ili okazas sub aŭspicio de UEA en la universalaj kongresoj de Esperanto, do unufoje jare.

La nombro de branĉoj en ili variis de epoko al epoko, kvankam ĉiam estis kaj restas bazo de la konkursoj la tradiciaj de prozo, poezio kaj teatro. Dum la vivtempo de la konkursoj aldoniĝis kaj malaldoniĝis pliaj, kaj nuntempe troviĝas jenaj: prozo, poezio, teatro, eseo, fotografio, infanlibro kaj, plej nove, kanto, kaj la premio Nova Talento, kiun ricevas tiu konkursanto, kiu meritas kuraĝigon. En du jaroj oni akceptis ankaŭ tradukaĵojn poeziajn kaj prozajn, sed nunepoke la konkursoj okupiĝas sole pri originalaj verkoj en Esperanto.

En la Belartaj Konkursoj de UEA rajtas partopreni ĉiu esperantisto, ne nepre membro de UEA, per maksimume tri verkoj en ĉiu branĉo. Pliaj detaloj pri konkretaj branĉoj kuŝas en la regularo pri la Belartaj Konkursoj, akirebla kontraŭ simpla peto ĉe la sekretario, Alĉo Venture, 22a Grosvenor Road, Wallington, Surrey, Britujo SM6 OEF, aŭ ĉe la Centra Oficejo de UEA, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando.

La premiitaj konkursaĵoj ricevas monpremion, kaj ili estas publikigataj, se eble, en la revuo Esperanto aŭ en alia revuo de UEA. Lastatempe, UEA subskribis kontrakton kun la literatura revuo Fonto, por ke tiu aperigu tiujn verkojn premiitajn, kiujn UEA mem ne povas aperigi. Krome, publikigas ankaŭ antologioj pri la Belartaj Konkursoj. Ĝis nun aperis unu, eldonita de la Hungara Esperanto-Asocio kun la permeso de UEA,

kiu titoliĝas "25 jaroj", kaj kiu transportas de 1951 ĝis 1976. En ĝi enestas tre interesaj rakontoj kaj poemoj, kun la ĉeesto de unu hispana aŭtoro, Gabriel Mora (dua premio ĉe poezio, 1968). Mi esperas, ke ni ne devos atendi pliajn dudek kvin jarojn, por povi legi la duan antologion!

Ĉi-jare estiĝis grava okazaĵo ĉe la belartaj por la esperantlingva hispana literaturo. María José Quesada, el Malago, gajnis la du unuajn premiojn ĉe la branĉo prozo per la rakontoj "Punenda peko" (la unua) kaj "Ensuĉo" (la dua). Certe rimarkindas, ke la trian premion gajnis akademiano Bernard Golden. Kaj ankaŭ, ke de 1968, kiam la supre menciita Gabriel Mora atingis sian premion, nul hispano sukcesis por ajna premio aŭ honorigo en la belartaj: post dek sep jaroj Hispanio denove eniras la liston de la gajnintoj. La rakontoj de María José premiitaj ĉi-jare aperos, kiel antaŭe sciigite, en la revuo Esperanto, aŭ, se ne en tiu, en la revuo Fonto.

(El la 8a paĝo)

la surfaco altiritaj de la molekuloj de akvo. La puriga agado de sapo dum la lavado baziĝas sur ĉi tiu eco de protektanta koloido. La malgrandaj partetoj de polvo kaj graso tegiĝas per maldika membraneto de sapo kaj, tiamaniere, estas facile trenitaj de la akvo de lavado.

Rafael López Castilla

REDAKCIA NOTO

Pro la lavango da petoj, kiuj flugis el la tuta mondo en la redakcion de La Cenaĉero postulantaj la aperigon de la vivhistorio de la mondkonata, malfeliĉega Cucufata, ni decidis publikigi popece ŝian turmentatan vivon por la edifiĝo de la legantoj, kio certe efikos duoblige. Eklegu, eklegu kaj ekploru sur la sekva paĝo.

Nur CUCUFATA

Cucufata estis malfeliĉa orfino, kiu havis nek patron, nek patrinon, nek hundeton, kiu boju al ŝi, nek elefanton, kiu bleku al ŝi; ŝi estis tre, tre kompatinda.

-Ho! Kiel kompatinda mi estas! -plendis Cucufata-. Mi ne povas lavi per "Colón", kiel la aliaj, kiel mia najbarino Pepi kaj mia bofratino Maria; ŭa, ŭa!

Tiumomente alvenis ŝia kruela onklo, kiu estis pli kruela ol onklo.

-Cucufata, kio okazas al vi? Vi ŝajnas muĝanta leono. Se vi ne tuj eksilentos, mi devigos vin vidi la programon "300 milionoj" kaj vi devos vidi ĝin de la komenco ĝis la fino.

Cucufata, tre nerveze, ekkriis:

-Ne, kara onklo, mi petas, ĉar poste mi frenezigos dum tri tagoj kaj mi deziras legi ĉiujn numerojn de la revuo "La Cenaĉero".

-Nu, do bone, preparu al mi baldaŭ la helikojn.

-Kaj, ĉu vi aĉetos al mi "Colón"? -demandis sopirege Cucufata.

-Por kio vi deziras "Colón"? -volis scii la onklo.

-Por diri tion al mia najbarino Pepi kaj al mia bofratino Maria.

-Sed vi ja ne havas bofratinton! Ĉu vi intencas trompi min? Malĉasta malpurigulino!

La onklo tre koleriĝis. Poste li diris:

-Preparu la helikojn al mi en la manĝeĉambron.

-Zorgu, onklo, ĉar el la formo de la manĝoj originas korpoŝanĝoj -diris malice Cucufata.

La onklo naive:

-Vi diras tion pro la konko...

-Mi diras tion pro la kornoj -asertis Cucufata dirante al si mem, ke ŝia onklo estas iom stulta-, ĉar antaŭ nelonge mi vidis vian fianĉinon, fraŭlinon Puri, kun iu...

-Malbenata! Mi batos vin...!

Kion faros la onklo al la malfeliĉa Cucufata? Kiu estas la mistera Puri?

La solvo en la dua ĉapitro.

AMUZAĴOJ

PLI KARA KAPO OL ĈAPO

En la lando Pim Pam Pum ekzistas de jarcentoj la tradicio, ke ĉe la reĝa datreveno oni liberigas tiun enkarcerigiton, kiu de plej longe loĝas en prizona ĉelo. Tion ĉiam volonte plenumis la reĝo, sed ĉi-foje temas pri speciale danĝera homo. Tial la reĝo, dezirante ne ellasi lin, decidis uzi privilegian rimedon por malhelpi la foriron. Ĉe ĉi kazoj la tradicio ebligas meti al la malliberulo enigmon, kaj, se li ne sukcesos ĝin solvi, li ne povos reakiri la liberon. Kaj la reĝo, plej malice, serĉas por li plej malfacilan problemon.

Li venigas antaŭ sin la enprizonulon kaj du siajn lakeojn, kaj tiele li lin alparolas:

-Jen mi havas tri blankajn ĉapojn kaj du nigrajn. Oni metos po unu ĉapon ajnkoloran sur ĉiun el vi, tiel ke ĉiu povos vidi tiujn de la du aliaj, sed ne tiun sur si. Se vi, mia kara malliberulo, divenos en difinita tempo, kiukolora estas la ĉapo de vi portata, vi reakiros vian liberon.

Kion dirinte, li ordonas la tri turniĝi kaj li igas ŝovi sur ĉiun viron blankan ĉapon, kaŝigante la du nigrajn.

-Vi jam povas vin turni. Se vi malkovros la viaĉapan koloron kaj donos logikan klarigon pri la eltrov-kielo, vi tute liberiĝos.

La malliberulo komencas stupore rigardadi la ĉapojn de la du aliaj, dum la minutoj pasas. La reĝo ridetas kontente, ĉar li vidas proksima la momenton de la reenkarcerigo. Sed, kiam li estas preta tuj gongigi la fiaskon de la ŝvitanta enkarcerulo, tiu krias:

-Blanka!

Tuj sekve li rakontas, kiel li eltrovis la koloron, kaj la reĝo, tre kontraŭvole, devas, laŭ la praa tradicio, ellasi lin.

Kiel li divenis la koloron?

Solvoj al la pasintnumeraj enigmoj

la enigmo: B paĝio

C kavaliro

2a enigmo: A kavaliro

B paĝio

AMUZAĴOJ

PLI KARA KAPO OL ĈAPO

En la lando Pim Pam Pum ekzistas de jarcentoj la tradicio, ke ĉe la reĝa datreveno oni liberigas tiun enkarcerigiton, kiu de plej longe loĝas en prizona ĉelo. Tion ĉiam volonte plenumis la reĝo, sed ĉi-foje temas pri speciale danĝera homo. Tial la reĝo, dezirante ne ellasi lin, decidis uzi privilegian rimedon por malhelpi la foriron. Ĉe ĉi kazoj la tradicio ebligas meti al la malliberulo enigmon, kaj, se li ne sukcesos ĝin solvi, li ne povos reakiri la liberon. Kaj la reĝo, plej malice, serĉas por li plej malfacilan problemon.

Li venigas antaŭ sin la enprizonulon kaj du siajn lakeojn, kaj tiele li lin alparolas:

-Jen mi havas tri blankajn ĉapojn kaj du nigrajn. Oni metos po unu ĉapon ajnkoloran sur ĉi-un el vi, tiel ke ĉiu povos vidi tiujn de la du aliaj, sed ne tiun sur si. Se vi, mia kara malliberulo, divenos en difinita tempo, kiukolora estas la ĉapo de vi portata, vi reakiros vian liberon.

Kion dirinte, li ordonas la tri turniĝi kaj li igas ŝovi sur ĉiun viron blankan ĉapon, kaŝigante la du nigrajn.

-Vi jam povas vin turni. Se vi malkovros la viaĉapan koloron kaj donos logikan klarigon pri la eltrov-kielo, vi tute liberiĝos.

La malliberulo komencas stupore rigardadi la ĉapojn de la du aliaj, dum la minutoj pasas. La reĝo ridetas kontente, ĉar li vidas proksima la momenton de la reenkarcerigo. Sed, kiam li estas preta tuj gongigi la fiaskon de la ŝvitanta enkarcerulo, tiu krias:

-Blanka!

Tuj sekve li rakontas, kiel li eltrovis la koloron, kaj la reĝo, tre kontraŭvole, devas, laŭ la praa tradicio, ellasi lin.

Kiel li divenis la koloron?

Solvoj al la pasintnumeraj enigmoj

la enigmo: B paĝio
C kavaliro

2a enigmo: A kavaliro
B paĝio